

Pri qwxy-alfabeto

Antonio Alonso Núñez (Hispanio)
nunjes@telefonica.net.- (Februaro 2013^a)

(1) Chi artikolo bazighas sur jenaj tekstoj:

(1.1) Paghoj 14^a/15^a de hpr_13_Esperanto.pdf (apartenanta al la retejo <http://venus.unive.it/canipa>), kaj mem la chapitro pri Esperanto de la anglalingva verko *A Handbook of pronunciation – English, Italian, French, German, Spanish, Portuguese, Russian, Arabic, Hindi, Chinese, Japanese, Esperanto* de Prof. Luciano Canepàri (j. 2005^a) ("Manlibro pri prononcado – Angla, Itala, Franca, Germana, Hispana, Portugala, Rusa, Araba, Hindia, China, Japana, Esperanto").

(1.2) Paghoj 113^a/114^a de <http://www.esperanto.es:8080/jspui/bitstream/11013/108/1/TriArtikoloj.pdf> (malnovaj artikoloj kaj notoj miaj, publikigitaj en j. 2011^a en nia Bitoteko).

Rimarkoj.- [i] En (1.2), kaj ankore nenion sciante pri (1.1), mi ludis pri la iama propono de René de Saussure modifi la esperantan alfabeton ("*...fonetika internacia alfabeto, sistemo Antido n-ro 2*" (j. 1910^a)), laueble eliminante el ghi chapelulojn kaj enkondukante en ghin la literojn *q, w, x, y* de la baza latina alfabeto (literoj daure neglektataj de Zamenhof, krome tiel, ke li neniam prezentis informon au argumenton pri tia neglektado –des malpli, konvinkan argumenton).

Nu, mi jhus sciighis pri tiu pli frua (1.1), mem scienca traktajho pri E-prononcado, kaj kies unu ero malvolvas nen lude, sed science kaj ja tre pli kompetente ol mi, pri la eblo uzi en la E-alfabeto la diritan liter-kvaropon *q, w, x, y*.

Che tio chi konstatablas, ke la nura formulado la problemon uzi tiujn literojn (vidu paragrafon (3)) kuntrenas kun si solvon almenaŭ por la problemokerno –kion pruvas ke mi, ludanta laiko, venis al koincido kun la kerno de la rezultoj al kiuj pli frue venis Prof. Canepàri, kaj pri tiu punkto uzante la samajn argumentojn kiel li.

Pro chio jhus dirita mi venis al la penso, redakti chi artikolon por prezenti kaj komenti tian aferon. •

[ii] Jen nura cito pri la chefaj partoj de la traktajho (1.1): Baza aserto "Esperanto estas socia fakto kaj vivanta lingvo".– Ecoj de la lingvo kaj utilo kiujn ghi povas chiuflanke alporti (ideala por scienco, ege tauga por lernado kaj instruado fremdajn lingvojn, ...).– Fonetika analizo de la fonemoj de E (vokaloj, plozivoj, ktp, kun artikulaciaj diagramoj kaj fonetika notacio), dissilabigo, akcentado, ritmo, intonacio (kun diagramoj), internacie neutrala prononcado de E kaj pluraj neneutralaj prononcadoj pro influado de respektivaj naciaj lingvoj (kun detalaj respektivaj transskriboj per la tre preciza fonetika alfabeto kies aŭtoro estas Prof. Canepàri mem).– "La tempo estas matura por definitive agnoski ke

la chapelitaj literoj estas la chefa obstaklo al presado kaj disvastigo de E-publikigajhoj".- "Certe, la plej moderna solvo –kaj plej utila por E-o mem– estus transiro al Esperanto "26", uzanta nur la 26 literojn de la latina alfabeto".

Nu, anstat " Esperanto "26" " mi preferas diri "qwx-y-alfabeto".•

(2) Ni komencu rekte prezentante iujn bone konatajn tekstojn, tamen jam rekte skribitajn lau la propono de Prof. Canepàri, tiel ke oni povu rekte kaj senprie iel jughu pri ghi ech ne ricevinte ian prieksplikon.

-- Jen la alineo A8 el *Antaŭparolo al Fundamento de Esperanto*:

"Se ia aŭtoritata centra institucio trovos, ke tiu aw alia vorto aw regulo en nia lingvo estas *tro neoportuna*, yi ne devos *forigi* aw *xanyi* la diritan formon, sed yi povos proponi formon *novan*, kiun yi rekomendos uzadi *paralele* kun la formo malnova. Kun la tempo la formo nova iom post iom elpuxos la formon malnovan, kiu fariyos *arkaismo*, kiel ni tion qi vidas en qiu natura lingvo. Sed, prezentante parton de la *fundamento*, tiuj qi arkaismoj neniam estos elyetitaj, sed qiam estos presataj en qiu lernolibroj kaj vortaroj samtempe kun la formoj novaj, kaj tiamaniere ni havos la certecon, ke eq qe la plej granda perfektigado la uneco de Esperanto neniam estos rompata kaj neniu verko Esperanta eq el la plej frua tempo iam perdos sian valoron kaj kompreneblecon por la estontaj generacioj".

-- Kaj jen parto de la alineo A10:

"yis la tempo kiam aŭtoritata centra institucio decidus *pligrandigi* (neniam *xanyi* !) la yisnunan fundamenton per oficialigo de novaj vortoj aw reguloj, qio bona, kio ne troviyas en la "Fundamento de Esperanto", devas esti rigardata ne kiel deviga, sed nur kiel *rekomendata*."

(3) La formulado la problemon pri kiu ni okupighas jenas: (a) Ni deziras pri alfabeto sen la ses literoj kompleksaj *Ĉ, Ĝ, Ĥ, Ĵ, Ŝ, Ŭ*.- (b) Por anstatigi chapelulojn ni disponas nur la kvar literojn simplajn *q, w, x, y*.

-- Evidente, ni povas rekte elimini kaj anstatigi nur kvar chapelulojn, tiel ke au jen ni rezignu pri la afero, au ni solvu tiuvoje la problemon por kvar el ili, kaj por la du restantaj provu trovi alian adekvatan anstatigon.

Nu, chi lastan vojon ni iru.

(4) Jen la propono de Prof. Canepàri lau **(1.1)**:

(4.1) Alfabeto.- Ghi konsistas el jenaj 26 literoj (kun formoj minuskla kaj majuskla, kaj ja chiu el ili poe responda al un sola fonemo, kaj reciproke):

a, b, c, d, e, f, g, h, i, j, k, l, m, n, o, p, q, r, s, t, u, v, w, x, y, z.

T.e.: Ghi konsistas ghuste el chiu j literoj simplaj de la baza latina alfabeto (nome, la 22 literoj de la fundamenta E-alfabeto malhavantaj chapelon au arkon, plus la 4 literoj *q, w, x, y* ne rolantaj en tiu). (En ghi ne rolas, do, la 6

specialaj, kompleksaj literoj \hat{c} , \hat{g} , \hat{h} , \hat{j} , \hat{s} , \check{u} de la principa fundamenta E-alfabeto).

(4.2) Fonemaro kaj ortografio.- (a) Tiuj 22 daŭrantaj literoj gardas siajn respektivajn fundamentajn fonemajn valorojn.- **(b)** Malaperas el la lingvo ne nur la chapeluloj \hat{h} , \hat{j} , sed anke iliaj sonoj (ja mem la plej malofte uzataj).

(c) Restas en la lingvo la sonoj de la kvar plej ofte uzataj chapeluloj (t.e., \hat{c} , \hat{g} , \hat{s} , \check{u}), sed ilin anstataigante per la novaj literoj, kiel montrate en chi apuda tabeleta kaj ekzemploj.

| | |
|---------------------------|---|
| $\check{u} \rightarrow w$ | $la\check{u}$ Eŭropo \rightarrow law Ewropo |
| $\hat{g} \rightarrow y$ | $\hat{g}i$ $\hat{g}enas$ \rightarrow yi yenas |
| $\hat{s} \rightarrow x$ | $\hat{s}i$ $\hat{s}vitas$ \rightarrow xi xvitas |
| $\hat{c} \rightarrow q$ | $\hat{c}e$ $\hat{c}inoj$ \rightarrow qe qinoj |

Rimarko.- Vidu en **(1.1)** kaj **(1.2)** –kiel anke en <http://en.wikipedia.org/wiki/Q, .../W, .../X, .../Y> –, ke chi shanghoj ne estas arbitraj, sed estas la alternativoj kiuj laueble maksimume sin apogas sur faktaj nacilingvaj uzoj de tiuj literoj.

Jen ekzemploj pri la kazoj plej deviaj disde la hispana ortografio:

| | |
|--|--|
| IL-PARLAMENT EWROPEW. En la malta lingvo (ew = eŭ) | <p>q (ch), as in <i>cheek</i></p> <p>ch (ch), as in <i>church</i>, strongly aspirated</p> <p>La du \hat{c}-sonoj en pinjino (t.e., la oficiala latinlitera skribsistemo de la china), [$tʃ^h$], [$tʃ^h$].</p> |
|--|--|

Pliaj ekzemploj:

| | |
|--|--|
| $amba\check{u} \rightarrow ambaw$ $balda\check{u} \rightarrow baldaw$ $balda\check{u}ajn \rightarrow baldawajn$ $anstata\check{u}igi \rightarrow anstatawigi$ $fra\check{u}lo \rightarrow frawlo$ $fe\check{u}do \rightarrow fewdo$ $k\check{u}aks \rightarrow kwaks$ $\check{u}a \rightarrow wa$ | $\hat{S}i \rightarrow xi$ $ka\hat{S}e \rightarrow kaxe$ $hu\hat{S} \rightarrow hux$ $\hat{S}an\hat{g}i\hat{g}i \rightarrow xanyiyi$ |
| $\hat{g}i \rightarrow yi$ $\hat{g}usta \rightarrow yusta$ (\neq <i>justa</i>) $doma\hat{g}e \rightarrow domaye$ $an\hat{g}elo \rightarrow anyelo$ (Vidu en (4.3.2) pri <i>aĝo</i> kaj <i>ĝeto</i>) | |
| $\hat{c}e\hat{c}ena \hat{c}i\hat{c}erono \rightarrow qeqena qiqerono$ | |

(4.3) Radikshanghoj.- Pro malapero de la literoj kaj fonemoj \hat{h} , \hat{j} , jen la vortoradikoj ilin havantaj ricevas shanghon en sia konsisto sona kaj ortografia.

Rimarko.- Mi opinias ke *yeteo* estas bona alternativo (Prof. Canepàri rimarkigas krome ghian parencecon kun *moleo*), sed ke *ajyo* au *ejyo* estus neoportunaj pro sia proksimeco sona al *ayo* kaj pro sia kaj malofta sonstrukturo kontrasta al la ofteco de la vorto mem (tiel ke oni devus trovi pli bonan alternativon).•

-- Por lasta ekzemplo, jen chi-apude bone konata frazo densa je chapeloj kaj arko, kaj la tri alternativaj manieroj ghin skribi sen diakritoj (t.e., sinsekve, per *h*-alfabeto, per *x*-alfabeto kaj per *qwx*-alfabeto).

| | |
|--------------------|--------------------|
| <i>eĥoŝanĝo</i> | <i>Ĉiuĵaŭde</i> |
| <i>ehhoshangho</i> | <i>chuijhaude</i> |
| <i>ehxosxangxo</i> | <i>cxiujxauxde</i> |
| <i>ehoxanyo</i> | <i>qiyuawde</i> |

(5) En mia ludo lau **(1.2)** temis pri jeno:

(5.1) Alfabeto.- Ghi estus egala al tiu en **(4.1)**, t.e.,

a, b, c, d, e, f, g, h, i, j, k, l, m, n, o, p, q, r, s, t, u, v, w, x, y, z.

(5.2) Fonemaro kaj ortografio.- **(a)** La literoj nigre skribitaj en **(5.1)** gardus siajn fundamentajn sonojn, kvankam la litero *h* ludus anke la kroman rolon pri kiu tuj temas.

(b) Estus gardataj la sonoj de la ses chapeluloj de la fundamenta alfabeto, sed estus shanghataj la literoj ilin reprezentantaj, kiel chi-apude

| | |
|----------------------|---------------------------------------|
| <i>ŭ</i> → <i>w</i> | <i>laŭ Eŭropo</i> → <i>law Ewropo</i> |
| <i>ĝ</i> → <i>y</i> | <i>ĝi ĝenas</i> → <i>yi yenas</i> |
| <i>ŝ</i> → <i>x</i> | <i>ŝi ŝvitas</i> → <i>xi xvitas</i> |
| <i>ĉ</i> → <i>q</i> | <i>ĉe ĉinoj</i> → <i>qe qinoj</i> |
| | |
| <i>ĵ</i> → <i>jh</i> | <i>ĵus ĵetis</i> → <i>jhus jhetis</i> |
| <i>ĥ</i> → <i>hh</i> | <i>ĥora eĥo</i> → <i>hhora ehho</i> |

montrate.- (Do, tie chi reaparas la punkto **(4.2)(c)**,

kaj krome estas gardataj la du malplej ofte uzataj formoj de la oficiale surogata *h*-alfabeto).

-- Rimarku ke en tio qi ne ekzistus propono por radik-shanghoj, kaj ke ghi povus respekti shanghojn ali-originajn, kiel, ekzemple, la chiam pli oftan anstatingon de *ĥ* / *hh* per *k*).

-- Kaj jen chi-apude pliaj ekzemploj.

| | |
|--|-----------------------------------|
| <i>eĵetitaj</i> → <i>elĵhetitaj</i> | <i>ehhoxanyo</i> <i>qiuĵhawde</i> |
| <i>arĥaismo</i> → <i>arhhaismo</i> / <i>arkaismo</i> | |

Rimarkoj.- [i] En mia ludo mi ne havis ech penseton pri radikshanghoj, sed simple pensis, ke char ja ne eblus anstatigi per litero simpla chiun chapeliton, jen eblus almene tion fari che la plej ofte uzataj el ili, tiele treege mildigante la nekonvenecon intrinsekan **[*]** al nia alfabeto, kiel anke ke ju pli la lingvo anstatigus la sonon *ĥ* per la sono *k* au lau aliu vojo, jen paralele malkreskus la uzateco de la dulitero *hh*.•

[*] *intrínseco, intrinsic, intrinsèque, intrinsisch.*

[ii] La kerno de chia ebla arango uzanta la literkvaropon q, w, x, y ja konsistas en tio, 'kiun rolon oni atribuas al tiuj literoj.- En la propono de Prof. Canepàri tiu kerno konsistas en la punkto **(4.2)(c)**.- Kun tiu chi koincidis (enhave kaj argumente) la kerno de mia ludo (t.e., la una parto de **(5.2)(b)**)-

Kaj jen chi-apude mia kompreno pri la kerno de la iama propono de René de Saussure (citita en **(1)(ii)**).

| Lau LZ II, p. 278 | Supozo mia |
|-------------------------|--------------------------|
| $\hat{g} \rightarrow q$ | $\hat{c} \rightarrow ch$ |
| $\hat{h} \rightarrow x$ | $\hat{s} \rightarrow sh$ |
| $\hat{j} \rightarrow y$ | $\hat{u} \rightarrow w$ |

LZ II donas informon nur pri q, x, y .- Mia supozo lau la dua kolono bazighas sur la faktoj, ke apene eblus aliu alternativo, ke tiuj duliteroj apartenas al la surogata h -alfabeto kaj, krome, ke ili tiel rolis en

en alii proponoj pri alfabet-reformo (ekzemple, Javal, j. 1906^a).

Che tio chi lasta rimarkindas ke, kvankam ja klaras la pli-malpli etima kaj/au nacilingva origino de la proponoj por x, y, ch, sh , jen estas surprize ke na du el la kvar disponataj literoj simplaj oni destinis por la malplej oftaj chapeluloj, kaj ke por du el la oftaj chapeluloj oni gardis la respektivajn duliterojn de la surogata h -alfabeto. •

(6) Ni venas nun al pluraj konsideroj pri la tuta afero:

(6.1) La abrupta elimino la sonojn kaj literojn \hat{h}, \hat{j} kune kun laua, same abrupta shango de chiuj koncernaj vortoradikoj lau **(4.3)**, ne estus, lau mia kompreno, konvena, char komplikiga kaj ech danghera por la lingvo.

Lau mia opinio, tian eventualan eliminon de sonoj kaj/au shanghon de radikoj oni lasu al la ordinara vivado kaj funkciado de la lingvo.

Rim.- [i] Se paroli ne nur pri mia opinio, sed anke pri miaj preferoj, mi diru ke la eliminon na tiuj maloftaj sonoj \hat{h}, \hat{j} (kio jam de longe parte okazas pri la una el ili) mi sentas perdo de fonetika estetikeco kaj richo, char por mia orelo agrablas la sporadaj pinchoj de iliaj sonoj en la parolo.- Krome, tia elimino ja portus al malpli klara indikado la etimojn de aro da vortoj. •

[ii] Parenca sed klare malsama afero estas la eblo treege malkreskigi la uz-oftecon de la diftonga arbitra kaj peza finajho $-a\hat{u} / (-au) / -aw$ (sekve, anke, la oftecon de w), ghin anstatigante per aliu ial pli konvena finajho (kiel en *morge* anstat *morgaw*, kaj de tio, *morgo*, *morgajn*, ktp). (Ja, tamen, nepre restas, ekzemple, *kontraw*, *kontrawa*, *naw*, ktp –kaj *frawlo* kaj similaj, kompreneble).

Pri la iama parta akcepto far Zamenhof na tia simpligo vidu en la citita artikolaro mia en Bitoteko, paghoj 1^a kaj pluraj sekvantaj.- (Anke en PAG 89 Rim II kaj PAG 300 D Rim IV).

-- Evidente, tia simpligo igas konsiderinde pli flua la skribon, kaj chefe la parolon.– Jen pliaj ekzemploj: El *anstataw* ni venas al *anstat*, *anstata*, *anstatigi*; *ambaw* ighas *ambaj(n)*, ktp). •

(6.3) En la supre metitaj argumentoj rolas la fakto, ke la literoj kaj sonoj \hat{h} , \hat{j} estas tiuj malplej ofte uzataj en la lingvo.

Pri tiu fakto ni chiuj havas propran rektan sperton, kaj tion konfirmas kaj precizigas la pristudoj faritaj. Nu, jen el du el ili:

(6.3.1) En http://www.lingviko.net/db/24_Haszpra.htm (j.1999), Prof. Ottó Haszpra studis pri korpuso kun 496.196 literoj el 25 diverstemaj tekstoj. El ghi mi cherpas kaj adaptas jenan tableton:

Uz-ofteco de la diversaj literoj en chiu 10.000-opo da literoj:

| <i>a</i> | ... | <i>h</i> | \hat{g} | \hat{c} | \hat{u} | \hat{s} | \hat{j} | \hat{h} | Entute |
|----------|-----|----------|-----------|-----------|-----------|-----------|-----------|-----------|--------|
| 1.259 | ... | 50 | 69 | 67 | 51 | 35 | 15 | 1 | 10.000 |

(6.3.2) En malneto pri geometrio de mi tajpita per *h*-alfabeto trovighas 321.602 literoj (kaj konsiderante un sola litero chiuon ties literduopon).

Nu, en ghi donighas jena liter-ofteco en chiu 10.000-opo da literoj:

| <i>a</i> | ... | <i>jh</i> | <i>hh</i> | Entute |
|----------|-----|-----------|-----------|--------|
| 1.125 | ... | 10 (*) | 1 (**) | 10.000 |

(*) En 7 el tiuj temis pri la sufikso *-ajh-*. (**) El tiuj, 0'5 rolis che la nomo *Arhhimedo*.

(6.4) Mi opinias probabla ke la malofteco de la litero kaj sono \hat{j} / *jh*, krome ligita chefe al la sufikso *-aĵ-* / *-ajh-*, auguras ties malaperon lau vojo analoga al tiu jam de longe sekvata de \hat{h} / *hh*.

(6.5) Lau **(6.3.1)**, jen \hat{s} estas iom malpli ofte uzata ol *h*. Krome, per PIV konstatablas, ke ekzistas malpli da vortoradikoj komencighantaj per \hat{s} ol per *h*.

El tio shprucas la eblo lude preferi la surogatajn *ehxoxanyo qiuĵawde* *hx*, *jx* al *hh*, *jh*, char per tio iom malkreskus la ebloj pri mistranchoj.

Rimarkoj.- [i] Ofta kritiko kontrau *h*-alfabeto ja estas, ke ghi povas naski miskomprenojn pro mistrancho. Nu, sur paghoj 44 c'), 54 kaj 55 de la artikolo **(1.2)** mi iom detale analizas pri la fakto, ke se entute *h*-alfabeto estas problemiga tiurilate, jen temas pri liliputa kresko de la problemo kadre de la grandega eblo de mistranchoj che chiuj ceteraj literoj, char, pro la absoluta aglutineco de esperanto, jen pli facilas kalemburi en ghi ol ech en la franca (kaj tio, negrave chu skribante per chapeloj, au per *h*, au per *x*, au per *qwxxy*.

| | | | |
|-----------------|-----------------------------|------------------|---------------------------|
| <i>muŜ'aro,</i> | <i>mush'aro / mus'haro,</i> | <i>musx'aro,</i> | <i>mux'aro</i> |
| <i>maĴ'oro,</i> | <i>majĥoro / maj'horu,</i> | <i>majxoro,</i> | <i>majĥoro / maj'horu</i> |

| | | |
|--|-------------------------------|-------------------------------|
| <i>majoro / maj'oro,</i> | <i>majorano / majo'rano,</i> | <i>ekstero / eks'tero</i> |
| <i>kuraĝo / kur'aĝo,</i> | <i>kuragho / kur'agho,</i> | <i>kuragxo / kur'agxo,</i> |
| <i>kurayo / kur'ayo</i> | | |
| <i>Ĉar'mulo / Ĉarm'ulo,</i> | <i>char'mulo / charm'ulo,</i> | <i>cxar'mulo / cxarm'ulo,</i> |
| <i>qar'mulo / qarm'ulo</i> | | |
| <i>perversa per-fida perfido per-versa</i> | | |

[ii] Eblas anke la kritiko, ke *qwxxy*-alfabeto plus duliteroj *hh*, *jh* au *hx*, *jx* estas nekohera kaj/au malestetika, kaj tial neakceptebla, ĉar hibridajho el literoj simplaj kaj el kompleksaj liter-surogatoj: Nu, kio tie ĉi gravas, tute ne estas hibrideco fronte al ia ial postulata ras-pureco, sed utileco fronte al malutileco.

Che tio oni krome konsideru, ke plia alternativo shajne ne eblus. Kaj ke, cetere, tia hibrideco estus en la praktiko liliputa pro la malofteco de tiuj sonoj, tiel ke oni bezonus lupeon kaj paciencon por ilin spuri tra la teksto –au, ja, tas-ki la komputilon, ilin spuri mem. •

(6.6) Aldonajhoj (pri kiuj mi ekpensis nur dum tajpado ĉi artikolon):

(a) Mia longega artikolo **(1.2)** havas subtitolon "*Jam temp' está!: Plia ple-do (ech se teda) por h-alfabeto*" (ĉar, kvankam fusha alfabeto, mi ghin opinias pli tauga káj ol la torturanta chapel-alfabeto káj ol la malbela *x*-alfabeto –ja be- daurinda situacio).

Krome, kaj kiel jam dirite, jen *qwxxy*-alfabeto siatempe estis por mi nura ludo. Tamen, la traktajho kaj propono de Prof. Canepàri revenigis en mian ka-pon la preske forgesitan ludon, kaj tio igas min multe kaj nove cerbumi pri la afero, tiel ke dum mi tajpas ĉi liniojn mi ankore ne venis al firma opinio, 'kiun el *h*-alfabeto kaj el *qwxxy*-alfabeto mi trovas preferinda por mi.

(b) Mi eksciis pri tiuj jhus diritaj traktajho kaj propono kiam mi pretigadis por publikigo en nia Bitoteko (tajpante per *h*-alfabeto) studkajeron kun titolo "*La Una Libro de la Elementoj de Euklido*, kun notoj kaj komplementoj lau preuni-versitata nivelo" (ja la teksto citita en **(6.3.2)**).

Nu, jen mi venas al la penso, ghin prove publikigi per *qwxxy*-alfabeto (kio, espereble, balde okazos).

=====